# La NASKa Fasko

*Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD*

**sabaton, la 2-an de Julio, 2011 • numero unu**


## Venontaj eventoj

### Sabato (hodiaŭ)

★ **5:45 ptm: Promeno al la manĝejo**
Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj. Ni piediros al la manĝejo *Oceanview Terrace*, nur kelkajn minutojn for.



★ **7:00 ptm: Interkona vespero**
Neformala kunveno por ekkoni unu la alian. Renkontiĝu antaŭ la loĝejoj, kaj ni iros al nia komuna ĉambro en *Cuzco*.

### Dimanĉo (morgaŭ)

★ **7:30 - 8:15 atm: Matenmanĝo**
en nia manĝejo, *Oceanview Terrace*

★ **9:00 - 10:00 atm: Komuna kunsido**
en nia klasĉambro en *Asante*

★ **10:00 atm - 12:30 ptm: Lecionoj**

★ **12:45 - 1:30 ptm: Tagmanĝo**
en nia manĝejo, *Oceanview Terrace*

★ **2:00 - 3:30 ptm: Promeno tra UCSD**
Ni vizitos kelkajn utilajn kaj/aŭ interesajn lokojn: vendejojn, bibliotekon, vestolavejon, kantantan arbon(!), ktp.

★ **3:30 - 6:00 ptm: LIBERA TEMPO!**

★ **6:00 - 6:30 ptm: Vespermanĝo**
en nia manĝejo, *Oceanview Terrace*

★ **7:00 - 8:00 ptm: Vespera programo**
en nia komuna ĉambro en Cuzco


***La NASKa Fasko***

**Redaktejo:** Cuzco 117
<nask.esperanto@gmail.com>

*La NASKa Fasko* estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sur la pordo de nia komuna ĉambro en Cuzco.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en Cuzco 117, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.


## Via unua tago ĉe NASK: kio okazas hodiaŭ?

*Hoss Firooznia jam laboras ĉe NASK ekde 2008. Li gvidas la eksterkursajn eventojn kaj redaktas la ĵurnalon* La NASKa Fasko *(kiun vi nun legas!) Bedaŭrinde, en tro sunoplenaj lokoj – kiel Sandiego, ekzemple – li devas porti ridindan ĉapelon por ke li ne fariĝu cindro.*



Bonvenon al NASK! Morgaŭ matene okazos enkonduka kunsido kaj la unuaj lecionoj. (Vidu la hortabelon sube.) Intertempe: ripozu, malpaku viajn posedaĵojn, kaj renkontu viajn samĉambraranojn!

**Hodiaŭ (sabaton) je la 5:45 ptm ni promenos grupe al vespermanĝo.** Serĉu min, la ulon kiu portas ridindan ĉapelon (vidu supre) ekster la loĝejoj *Cuzco* kaj *Asante*. Mi kolektos vin ĉiujn kaj gvidos vin al la manĝejo *Oceanview Terrace* – nur kvin minutojn for, piede.

**Poste, je la 7:00 ptm okazos neformala interkona vespero en nia komuna ĉambro en Cuzco.** Denove, serĉu min ekster la loĝejoj kaj mi montros al vi la vojon!

*Se vi bezonas ajnan helpon dum NASK, bonvolu kontakti al Ellen en Cuzco 116 aŭ al mi en Cuzco 117. Vi povas atingi nin ankaŭ telefone: (206) 300-9724 [Ellen] kaj (585) 687-8082 [Hoss].*

Welcome to NASK! Tomorrow we'll have an introduction to NASK followed by classes. (See the schedule below.) In the meantime, relax, unpack your belongings, and meet your suitemates!

**Today (Saturday) at 5:45 pm we'll head to dinner as a group.** Look for me, the guy in the goofy hat (see above) waiting for you outside our dorms, *Cuzco* and *Asante*. I'll gather everyone together and lead you to *Oceanview Terrace*—just five minutes away on foot.

**Later, at 7:00 pm there'll be an informal "meet and greet" evening in our common room in Cuzco.** Again, look for me outside the dorms and I'll show you how to get there!

*If you need any help during NASK, contact Ellen in Cuzco 116; you can also find me in Cuzco 117. You can reach us also by telephone, at (206) 300-9724 [Ellen] and (585) 687-8082 [Hoss].*

## Salutmesaĝo de la administranto



*Ellen Eddy administras nian kursaron. Se vi havas demandojn aŭ se vi bezonas helpon, vi povas atingi ŝin telefone per 206-300-9724, rete per <eddyellen@aol.com> aŭ en Cuzco 116.*

Estas bone finfine meti vizaĝojn al la retadresoj kiujn mi ricevis dum la lastaj monatoj. Ni jam solvis multajn problemojn antaŭ via alveno sed mi ankaŭ estas preta helpi pri la etaj problemoj kiuj ofte okazas je la komenco de sesio. Mi loĝas inter vi en Cuzco 116. Se mi ne estas en la apartamento, lasu noton sur la pordo kaj mi provas helpi vin kiel eble plej rapide. Mi esperas ke ĉio iros glate kaj ke vi revenos hejme kun multaj bonaj spertoj, belaj fotoj, novaj geamikoj, kaj pli bona kono de Esperanto.